# GDYNIA GDYNIA



Mara Stacidomo

*Fot. H. Poddębski*

# POLLANDO POLLANDO

Muzeum Miasta Gdyni - Biblioteka - w Gdyni
7951/M2



Marbordo apud Gdynia


*Fot. E. Raulin*

# G D Y N I A

Gdynia — pola haveno — »Pordego de Pollando al la mondo«, estas situita sur la bordo de Puck'a golfo ĉe Balta Maro.

Iama malgranda fiŝkaptista vilaĝo, nombranta ankoraŭ en 1921 j. 3.000 loĝantojn, en periodo de dekvinjara pola mastrumado ĉe Balta Maro fariĝis urbo kun ĉirkaŭ 110.000 loĝantoj kaj iĝis tre grava haveno ĉe Balta Maro.

Por turistoj Gdynia estas interesa kiel banloko, haveno kaj moderna urbo.



Ĉe la bordo *Fot. Cz. Olszewski*

# GDYNIA KIEL BANLOKO KAJ SOMERRESTADEJO

havas multajn kvalitojn. Pitoreskaj montetoj, krute malsupreniĝantaj al la maro, lasas ĉe la bordo sufiĉe larĝan sabloplenan plaĝon, kiu etendiĝas de l'centro de la urbo ĝis Zoppot. Ĝiaj plej vastaj kaj plej belaj partoj estas en Orłowo kaj Redłowo. La maro jen ŝaŭmanta kaj muĝanta minace, kun arĝentaj ondkrestoj surdorse, jen tute trankvile brilanta diverskolore, altiras la okulon de ĉiu alveninto. Por agrabligi al gastoj restadon ĉe la maro oni faris multajn diverspecajn banaranĝojn. La aero saturita per ozono kaj jodo efikas bonege la sanon de ĉiu alveninto. Tre multe da ozono kaj jodo estas precipe en Orłowo, ŝirmita kontraŭ okcidentaj ventoj per montetoj, kovritaj de pinarbaroj.

Krom marbanoj dum la sezono, oni povas ankaŭ poste ĝui varmajn marbanojn en moderna speciale tiucele arangita banejo.

La sezono en Gdynia komenciĝas jam la 15-an de majo kaj daŭras ĝis duono de oktobro.

La naturriĉeco de la marbordo en Gdynia estas granda kaj aldonas al la loko multe de ĉarmo. Sur montetoj, kies alteco atingas eĉ 100 metrojn kaj kiuj ĉirkaŭas de tri flankoj Gdynia'n, leviĝas al ĉielo belaj pin- kaj fagarbaroj. Apudmaraj arbaroj, tratranĉitaj per pitoreskaj vojetoj kaj aleoj, ŝajnas enfali rekte en la maron. Pro facile alireblaj bordoj oni povas fari piede multajn proksimajn kaj malproksimajn ekskursojn laŭlonge de la plaĝo aŭ tra mon-




Ŝipoj de „Żegluga Polska“ — *Fot. H. Poddębski*

tetoj Redłowskie (Redłovaj). La plej bela promenvojo kondukas el la centro de l'urbo al Orłowo laŭlonge de l'marbordo. Granda allogo estas belegaj arbaroj, kovrantaj dense montetojn okcidente de la urbo. El tiuj ĉi montetoj vidata estas grandioza panoramo de la urbo kaj haveno, desegniĝantaj pitoreske sur fono de la safira maro.

Granda emociplena atrakto estas promenveturoj sur la maro per ŝipo, kutro, boato aŭ barko, kaj precipe kelkhoraj ekskursoj al najbaraj apudmaraj ĉirkaŭaĵoj, antaŭ ĉio al la duoninsulo Hel.

Vespere kaj dum pluvaj tagoj oni povas amuziĝi en kafejoj, kino, danc- kaj koncertsalonoj; orkestro de militista ŝiparo ludas sur la promenejo kelkfoje semajne.

La vivo de somergastoj koncentriĝas en Kamienna Góra (Ŝtona Monto) — kvartalo de belaj vilaoj, kie estas multaj elegantaj pensionoj — kaj en Orłowo, kie oni konstruas ĉiujare novajn domojn kaj kiu fariĝis unu el plej ŝatataj lokoj ĉe la marbordo.

La klimato de Gdynia kaj ĝia aero estas taŭga por homoj malsanaj je laringo kaj nazo, samkiel por resaniĝantoj kaj personoj nerve elĉerpitaj.

## L A H A V E N O D E P O L A R E S P U B L I K O

El sub la kruco sur Kamienna Góra (2) etendiĝas belega perspektivo al la maro. En malproksimo desegniĝas arbaroj sur la sabloplena duoninsulo Hel. Malsupre, ĉe piedoj de la monto kuŝas Gdynia, Haveno de



Ĉefa enirejo de la haveno *Fot. E. Rautin*

Pola Respubliko, konstruita dank' al streĉa laboro de la tuta pola nacio kaj de ĉiuj Registaroj de libera Pollando. Ĝi imponas per amaso da potencaj ŝtalaj grandegaj leviloj, klare videblaj sur fono de kvieta akvospaco.

En treege mallonga tempo estas tiu ĉi haveno konstruita. Ankoraŭ en 1924 estis ĉi tie herbejoj kaj torfterenoj, netuŝitaj per homa mano. Ekbolis laboro. Potenco de homa peno antaŭenŝovis en la maron pli ol duonkilometran moleon, eniĝis en la kontinenton, kreante profundajn kaj grandajn basenojn.

Ĉe Balta Maro elkreskis granda kaj potenca haveno. Hodiaŭ Kopenhago, Stokholmo, Gdańsk (Danzig), Königsberg, Stettin, Helsinki, Riga, Talinn koncerne havenajn spezojn cedas al Gdynia. Gdynia ne nur mem pligrandiĝis, sed pro sia vigla ŝipnavigacio en la haveno kaj pro grandega vartrafiko kaŭzis disvolviĝon de preskaŭ ĉiuj havenoj ĉe Balta Maro. En la landa mastrumado Gdynia havas unuarangan signifon. Tra tiu ĉi haveno estas transportataj jare 7.000.000 da tunoj da varoj, kio faras 40% de la ĝenerala vara spezo inter Pollando kaj eksterlando.

Gdynia-haveno, antaŭ nelonge ekskluzive karbhaveno, akiras pli kaj pli da novaj varoj, kiuj antaŭe estis venigataj pere de fremdaj havenoj. Tio, komprenenble, kaŭzis multajn elspezojn por Pollando. Nun rekte al Gdynia venas kotono, ferminaĵo, sudaj fruktoj, felo k. t. p.

Por viziti la havenon sufiĉas 1—2 tagoj, tamen observado de navigacio en la haveno, kie ofte albordiĝas ŝipoj kun ekzotaj ŝipanaroj, kaj alrigardado al la tre interesa varŝarĝado povas altiri la okulojn de scivolema turisto dum kelkaj tagoj, eĉ dum kelkaj semajnoj.




Transŝarĝado de aŭtomobiloj

*Fot. E. Raulin*


Oni devas viziti la havenon flanke de la kontinento, ĉirkaŭirante alterne la moleojn kaj kajojn, samkiel flanke de la maro, uzante la motorboatojn, kiuj estas ĉiam je dispono de turistoj. Gvidistoj, troviĝantaj en la motorboatoj, donas fakajn klarigojn pri la konstruo de la haveno, ĝiaj aranĝoj kaj laboro.

Ni rigardu la planon de la haveno (sur la lasta paĝo). El la multaj vidindaĵoj ni citu la plej gravajn.


Sur la fiŝkaptista moleo flanke de la suda baseno troviĝas haltejo por fiŝkaptistaj kutroj (3). La blankaj kutroj, pentrinde starigitaj unu apud la alia, respeguliĝas belege en la trankvila akvo de l'baseno. En Gdynia fiŝkaptado disvolviĝas kontentige. Fiŝkaptistoj uzas nuntempe motorkutrojn anstataŭ velboatojn, aplikas modernajn ilojn por fiŝkaptado, kio donas al ili eblecon provizi Pollandon per la nutra, bongusta kaj malmultekosta artiklo, kia estas maraj fiŝoj. Apude Fiŝa Malvarmigejo (4) konservas fiŝojn en freŝa aŭ en frosta stato. Nemalproksime troviĝas grandaj magazenoj por haringoj (5), fiŝ-fumaĵejoj kaj konservfabrikoj (6).

La plej impona pro sia impeto, forto kaj potenco de tekniko estas la karbmoleo. Ĉi tie okazas transŝarĝado de »nigraj diamantoj« el vagonoj en ŝipojn. Pli ol 5.000.000 da tunoj da pola karbo migras en la vastan mondon tra Gdynia. Laboras ĉi tie kelkdek potencaj leviloj. Inter ili la plej granda estas la vagonlevilo (9), kiu sur speciala platformo suprenigas vagonon da karbo, transportas ĝin super la aperturon en la ŝipo kaj enŝutas en ĝin la tutan enhavon de la vagono. Ĉi-ĉio daŭras nur tri minutojn, kio ebligas transŝarĝi 400 tunojn dum unu horo. Ankoraŭ pli bone laboras du ruband-aranĝoj (10). Ĉiu el ili transŝarĝas 600 tunojn pohore.

Ĉe la pasaĝera moleo estas konstruita giganta Mara



Vagonlevilo *Fot. E. Raulin*



Varlevilo *Fot. E. Raulin*

Stacidomo (11), al kiu albordiĝas transoceanaj vaporŝipoj kaj sur kies peronojn alveturas ĉiuj trajnoj. Malantaŭ la stacidomo troviĝas grandegaj havenaj magazenoj.

Apud la Mara Stacidomo en la loko, kie nun staras la Havenoficejo (12), ankoraŭ en la jaro 1925 estis vojo, liginta la vilaĝon Gdynia kun la vilaĝo Oksywie. Hodiaŭ tiujn ĉi ambaŭ kvartalojn de Granda Gdynia disigas la ĉefa kanalo, kiu kondukas al la internaj basenoj. La profundo de la Kanalo estas pli ol 12 mtr. kaj la profundo de la havenaj basenoj 8—12 mtr., dank' al kio povas eniri ĉi tien ĉiuj vaporŝipoj, eĉ transoceanaj, tralaseblaj nur de la Kiel'a Kanalo.

Ĉe la baseno de Marŝalo Piłsudski lokiĝis potencaj havenaj magazenoj, tra kiuj oni veturigas sukeron (»Sukerhaveno«) (13) kaj etajn objektojn.

Vizitinda estas la impona Havena Malvarmigejo, kiu estas la plej granda en Eŭropo: en ĝiaj magazenoj povas lokiĝi samtempe 1200 vagonoj da varoj.

Sur la t. n. Hinda kajo, lokita apud la baseno de Marŝalo Piłsudski, evoluas iom post iom la industrio.

En la Senŝeligejo de Rizo (15) oni pretigas el kruda rizo manĝeblan produkton por en-kaj eksterlanda bezonoj.

Alia grava entrepreno estas la oleofabriko »Union« (16), kiu produktas el eksterlandaj krudajoj kaj oleosemoj manĝeblajn kaj teknikajn oleojn.

Iom pli malproksime de ĉi tie oni komencis konstrui grandan Grenan Elevatoron (17), dank' al kiu Gdynia akiros novan komercfakon, kiu troviĝas provizore ankoraŭ en fremdaj manoj.

Rimarkindaj estas entreprenoj, kie maturiĝas sudaj fruktoj, kie oni riparas kaj konstruas ŝipojn (Ŝipkonstruejo, pole: Stocznia Gdyńska) (8), kaj kie oni nur konstruas jaĥtojn (Jaĥtkonstruejo) (7).



Motorŝipo „Piłsudski“ *Fot. E. Raulin*

Tute aparte en la haveno lokiĝas Oficejo, kie oni liberigas varojn de la dogano. Ĝi okupas kajojn ĉirkaŭ la baseno de Ministro Kwiatkowski. Tiun ĉi Oficejon traveturas varoj (precipe kotono), kiuj sen dogano povas libere traveturi Polujon kaj kiuj estas venigataj tra Gdynia al Ĉeĥoslovakujo, Rumanujo, Hungarujo kaj pluraj aliaj landoj.

Fine en nord-okcidenta parto de la havena kanalo estas konstruitaj grandegaj magazenoj por ligno, kiu post karbo estas dua laŭvice produkto de pola eksporto tra Gdynia.

* * *

Estas malfacile imagi, ke en la daŭro de unu dekjaro oni konstruis 11 kilometrojn da kajoj, kiuj ĉirkaŭas per siaj ŝtonaj brakoj 320 ha da akvospaco; 160 kilometrojn da fervojoj, 16 kilometrojn da vojoj; 61 diversspecajn levilojn, kiuj povas samtempe suprenlevi 250 tunojn kaj dank' al kiuj estas transŝarĝeblaj 7000 tunoj hore; 35 havenajn magazenojn kun suprajo de ĉirkaŭ 200.000 metroj; fine delkkelk konstruaĵojn, en kiuj troviĝas diversaj oficejoj, ligitaj kun la laboro de l'haveno.

Tiu ĉi juna haveno povas esti fiera pro la jam traveturintaj ĝin milionoj da var-tunoj. En la jaro 1929 oni transportis tra Gdynia proksimume 3.000.000 da tunoj da diversaj varoj, en la lasta jaro — pli ol 7.000.000.

Pro la grandegaj importo kaj eksporto evoluas navigacio en la haveno. Ĉiam pli novaj, pli grandaj vaporŝipoj sub flagoj de 40 diversaj nacioj alvenas al Gdynia, kaj ilia nombro superis jam 4.500.

Inter tiu ĉi amaso da enirantaj al Gdynia vaporŝipoj, nur malmulto apartenas al Polujo. La pola komerca ŝiparo nombras apenaŭ 60 vaporŝipojn, inter kiuj 5 transoceanajn: »Kościuszko«, »Pułaski«, »Polonia«, »Piłsudski« kaj »Batory«. Precipe la du lastaj vaporŝipoj estas fieraĵo ne nur de la pola ŝiparo, sed ankaŭ de la tuta pola nacio.

Trankvile kaj energie laboras la haveno, ĉar ĝi scias kaj sentas, ke sur la alia havenbordo zorgas pri ĝia sendanĝereco la ŝtalaj militŝipoj, kiuj minace rigardas ĉiun, kiu kuraĝus preni eĉ sableron el la negranda pola marbordo, 2 grandaj torpedŝipoj, la plej rapidaj sur Balta Maro, veturantaj kun rapideco de 33 nodoj aŭ 60 klm. pohore, 3 subakvaj ŝipoj, 5 torpedŝipoj, 2 kanonŝipoj kaj 11 helpŝipoj. — Jen estas nia potenco sur la maro.



Lerneja skolta ŝipo „Zawisza Czarny" *Fot. E. Raulin*

# G D Y N I A K I E L U R B O

Gdynia estas la plej nova pola urbo, ĉar urban konstitucion ĝi ricevis en la jaro 1926. Hodiaŭa Gdynia konsistas el kelkaj iamaj fiŝkaptistaj vilaĝoj kaj el kelkaj terbienoj: Gdynia, Kamienna Góra, Grabówek, Oksywie, Chylonia, Obłuże, Witomino, kaj fine el aligitaj en la jaro 1935 komunumoj: Orłowo Morskie kaj Cisowa.

Koncerne grandecon de la okupita tereno Gdynia cedas nur al Varsovio, Vilno kaj Poznań. La ĝenerala surfaco de la urbo estas 66 klm.² kaj ĝia longeco laŭlonge de la fervojo atingas 16 klm. La nombro de la loĝantoj kreskas tre rapide — en la jaro 1923 loĝis en Gdynia 3.000 homoj, nun — 110.000.

Enprofundiĝante en la historion de la tereno, kiun okupas hodiaŭa Gdynia, oni povas, esplorinte tieajn elfosaĵojn, konstati, ke alvenadis ĉi tien siatempe feniciaj kaj romanaj komercistoj por akiri altvaloran sukcenon. En diversaj historiaj dokumentoj ni trovas menciojn pri Oksywie, kiuj koncernas la XIII-an jarcenton. Interalie estas sciate, ke Zwinisława, la edzino de pomerania duko Mestwin, donacis en 1209 j. la kamparon Oksywie al Fratinoj Norbertaninoj en Żuków. En la sama Oksywie ni trovas postsignojn de pol-svedaj militoj, de la venka batalo de l'pola ŝiparo apud Oliwa, kaj fine de Napoleonaj militoj.

Tamen sur la teritorio de Gdynia restis neniaj memoraĵoj kaj neniaj historiaj konstruaĵoj, krom preĝejeto, leviĝanta sur la alta bordo de Oksywie (20).

Gdynia, tute moderna urbo, estas ankoraŭ en stadio de intensa konstruo. Turisto trovos ĉi tie nek malnovajn monumentojn, nek antikvajn vidindaĵojn, mirigos lin, anstataŭe, eksterordinara laborrapideco. Ĉiumonate elkreskas en Gdynia kelkdek domoj. Tiuj, kiuj ne vidis Gdynia'n depost kelkaj jaroj, apenaŭ rekonas la urbon. Tie, kie ankoraŭ antaŭ kelkaj monatoj ondiĝis maturaj oraj grenspikoj, leviĝas nun 6-etaĝaj domoj. Tre vidinda parto de malnova kaj samtempe nova Gdynia estas str. Starowiejska.

Al tre belaj konstruaĵoj en Gdynia apartenas: Regiona Tribunalo (21), Agrikultura Banko (22), Pola Banko (23), Poŝtoficejo (24), Banko de Enlanda Ekonomio (25), Ŝtata Metereologia Instituto (26), »Pola Navigacio« (»Żegluga Polska«) (27), Mara Lernejo (28), Instituto de Mara




Mara Lernejo *Fot. Cz. Olszewski*

Komerco kaj Havena Tekniko (29), Fervoja Stacidomo (1), Registara Komisarejo, Sindikato por Elmigrantoj kaj multaj aliaj konstruaĵoj, apartenantaj al privataj personoj.

Dank' al streĉa laboro de la Urbestraro Gdynia havas tre bonajn kaj oportunajn stratojn, akvokondukilojn kaj elektran lumon.

Post vizitado de la urbo kaj de la haveno ni ree supreniras al Kamienna Góra, kie staras la kruco. Tie ĉi estos starigita Mara Baziliko memore al reakiro de la aliro al Balta Maro. Krepuskiĝas. Ni rigardas la urbon kaj la havenon, niajn novajn konatojn. Ili dronas en miloj da lumoj. Belega, sorĉa, neforgesebla vidaĵo. Centmiloj da turistoj alvenas ĉiujare al Gdynia. Ĉiu polo sentas hodiaŭ bezonon viziti la apudmaran ĉefurbon, kaj fremdlandanon allogas la eksterordinara rapideco de evoluo de la urbo kaj haveno. Diversaj vojoj kondukas tien. Oportuna fervoj-trafiko ligas Gdynia'n kun la tuta Polujo. Vojaĝo el Varsovio al Gdynia daŭras apenaŭ 7 horojn. Bonegaj ŝoseoj kondukas tra la tereno de Libera Urbo Gdańsk kaj tra Kartuzy. Al interesaj ekskursoj apartenas vojaĝo per ŝipoj de »Vistula« el Varsovio tra Tczew al Gdynia laŭlonge de la rivero




Doko en Gdynia *Fot. E. Raulin*

Vistulo. Tiu ĉi vojaĝo estas bonega ripozo. La plej rapida kaj la plej malmulte laciganta vojaĝo al Gdynia el Varsovio estas per aeroplano dum 2 horoj.

Kvardek regulaj marlinioj ligas Gdynia'n kun 200 havenoj disĵetitaj en la tuta mondo. Tiu ĉi trafiko kun ĉiuj havenoj de Balta Maro kaj de Okcidenta Eŭropo estas oportuna, komforta kaj rapida.

Konstantan komunikadon per ŝipoj de »Żegluga Polska« (»Pola Navigacio«) inter Gdynia kaj Hel, Jastarnia kaj Orłowo uzas jare kelkdek miloj da personoj.

Gdynia servas kiel elirpunkto por multaj ekskursoj al la plej belegaj apudmaraj ĉirkaŭaĵoj kaj al Szwajcaria Kaszubska (elp. Ŝwajcarja Kaŝubska, esp. Kaŝuba Svislando). Vizitinda estas la duoninsulo Hel kun siaj banlokoj Hel, Jastarnia, kaj precipe la moderne aranĝitaj Jurata, Puck, Swarzewo (elp. Swaĵewo), Rozewie, Jastrzębia Góra (elp. Jastŝenbja Gura), Karwia, Zarnowiec kaj Wejherowo. Valoras enprofundiĝi en pitoreskajn arbarojn de Kaŝuba Svislando, ornamitajn de belegaj lagoj, kies nombro superas 200. Gravaj celpunktoj estas Kartuzy, Chmielno, Wieżyca kaj Kościerzyna (elp. Hmielno, Wjeĵica, Koscjeĵina).

Informas pri la kongreso:

Loka Kongresa Komitato de la 29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, Warszawa I, str. Chmielna 26 m. 8.

Informojn koncerne vizitadon de Gdynia donas:

Turisma Fako de Registara Komisarejo ĉe str. Świętojańska.

Turisma Informoficejo de Registara Komisarejo en la Fervoja Stacidomo.

Asocio por Turisma Propagando de Gdynia ĉe str. Waszyngtona (domego de „Żegluga").

Vojaĝoficejo „Orbis", Skwer Kościuszki.

Liga Popierania Turystyki (Ligo por Protekto de Turismo) Varsovio, str. Mokotowska 61.

Polaj Ŝtataj Fervojoj
1937




MORZE BAŁTYCKIE




ČEFAJ FERVOJAJ LINIOJ

Printed in Poland. Drukarnia Narodowa w Krakowie.